Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

La 3-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 24 – 27 novembro

# Facila Vento

26-a de novembro 2022, numero 4

Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## Duncan Charters pri la 3-a Virtuala Kongreso



En sia salutmesaĝo, UEA-Prezidanto Duncan Charters atentigis pri la defioj de Virtuala Kongreso kiam aliĝas Kongresanoj el ĉiuj mondpartoj kaj horzonoj, sed pro la avantaĝoj indikis ke tre verŝajne ni daŭrigos ilin kaj esploros ĉu ni havos en la estonteco kongresojn en pli hibrida formo. Li priparolis la defiojn de la grandaj strukturaj ŝanĝoj en UEA, unue ke ni ne plu havos la Centran Oficejon kie okazis la administrado de UEA dum 60 jaroj. UEA daŭre havos sian juran centron en Nederlando, sed aliaj servoj povos veni de diversaj partoj de la mondo. Li donis la ekzemplon de E@I, kiu prizorgis la teknikan flankon de la Kongreso kaj faris tiel grandan laboron tiucele ke ni devas certigi ke niaj postuloj ne superŝutos ilin pro la bezonataj taskoj kiun ili tiel efike prizorgas. Li aludis al la tre aktiva kunlaborado de la nuna Estraro de UEA, kaj indikis la planon inkluzivi la membrojn de UEA en la planado por la venonta jaro, kaj aparte en la decidoj pri kiuj servoj ni devas provizi al la membroj, kaj kiel ni rilatos al la ekstera mondo. Li anoncis la du sesiojn pri strategia planado kiuj okazos por malsamaj horzonoj, organizitaj laŭ la resumo aperinta en la jam elŝutebla decembra numero de la revuo *Esperanto*. Li parolis pri la kunlaboro inter UEA, TEJO kaj ILEI, evidentigita per la kuna VK kaj Retoso kaj la venontjara komuna kongreso de TEJO kaj ILEI post la UK en Torino, por kiu ni kuraĝigas kaj atendas grandan partoprenantaron. Li petis paciencon pri la ŝanĝoj dum ni esploros kiel plej efike utiligi la talentojn kiujn ni havas en niaj rondoj, kaj daŭran subtenon al UEA, ankaŭ finance laŭ la kapabloj, per aldonaj donacoj, membriĝo en Societo Zamenhof, kaj kontribuado al la aliaj rimedofontoj de la Asocio. Li aparte petis ke ĉiu partoprenanto elektu interne de UEA almenaŭ unu vojon por kontribui al nia kuna laboro por antaŭenigi nian belan lingvon kaj idearon. Li esperis ke ĉiuj ĝuos la VK kaj kontribuos al tiu celo.

## Emblemoj de la Virtualaj Kongresoj

En 2020, emblemo de la unua Virtuala Kongreso uzis tri primarajn kolorojn: flavan, ruĝan kaj bluan. Nu, kun eta verda steleto ankoraŭ por simboligi nian aferon, Esperanton. Kaj tiuj koloroj fariĝis marko de la evento. Emblemoj mem aludas ĉefajn temojn de la kongresoj.

**VK-1**
UN 75-jara: Dialogo kaj interkompreniĝo en ŝanĝiĝanta mondo

**VK-2**
Paco kaj Konfido: universalaj valoroj


**VK-3**
Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj

# La 3-a Reta Oratora Konkurso

La 25-an de novembro la trian fojon okazis Reta Oratora Konkurso. Nome de la Komisiono de UEA pri Oratora Konkurso ĝin gvidis Leandro Abrahão.




Konkursantojn salutis Siru, kiu gajnis la konkurson antaŭ du jaroj kaj nun estas ĝia ĵuriano. Mark Ĵiro deziris al la kandidatoj kuraĝon kaj plezuron.








Ĉi-foje sin proponis nur du kandidatoj. Ili devis elekti unu el la sekvaj temoj:

- ★ Kiam indiĝena lingvo mortas...
- ★ Indiĝenaj lingvoj pluvivus, se...
- ★ Mi aparte ŝatas mian indiĝenan lingvon, ĉar...

La parolo devis daŭri ne pli ol dek minutojn kaj ne devis esti skribita anticipe, nur eblis uzi iom da notoj.

La unua kandidato estis Eko Nursyah Hidayat el Indonezio kun la temo "Mi aparte ŝatas mian indiĝenan lingvon, ĉar...". Lia prezento similas al tiu de Lingvaj Festivaloj, sed ja multe pli mallongas. Tamen la oratoro sukcesis bele prezenti al la aŭskultantaro lingvon Java. En lia lando estas multaj insuloj, triboj, centoj da lingvoj. Java lingvo havas longan historion, ĝi aperis en la 9-a jarcento kaj multon prenis de Sanskrito. La lingvo havas abundan vortprovizon, ekzemple, ĉiu ido de ĉiu besto havas propran nomon! Tre malsimilas formala kaj ne formala formoj de la lingvo, la lingvo havas propran skribmanieron ktp. La prezento estis vere informoplena kaj agrable-strukturita.




La dua kandidato, Ikvero Almejda el Brazilo, elektis la temon "Indiĝenaj lingvoj pluvivus, se..." Li eĉ havis etan bild-tekstan prezentaĵon. Ruze ;) Sed tute kon-




grue kun postuloj de moderna aŭskultantaro. Li rakontis, kiel helpas la pluvivadon de lingvoj diversnivela konscio pri ili. Ni devas konscii ilian lokon en historio kaj en nuna ĉiutaga vivo. Ni devas kompreni la ligon inter civilizacio, ĝia popolo, kaj kulturo uzante evoluon de ĝia lingvo. Oratoro rimarkis, ke ĉiutage multaj el ni uzas indiĝenanjn lingvojn eĉ ne komprenante tion. Kiel ekzemplon li prenis kelkajn moderajn nomojn de la urboj, kiuj iam nomiĝis signife kaj nun ni prononcas la nomon, ne plu komprenante signifon de vortoj ene de ĝi. Konscio –> zorgo – proklamis la lasta bildo de prezentaĵo. La parolo estis inspiriga kaj bele prezentita.

Post ambaŭ paroloj aperis unu demando (de Fernando Maja):

**Kiun lingvon nuntempe preferas por instruo la lernejoj kaj universitatoj en Indonezio?**

Ne restis tempo por la respondo kadre de la programero, do se Eko sendos al ni la respondon, ni nepre publikigos ĝin en sekvaj numeroj de la *Facila Vento*.

## Ni atendu la rezultojn!

Vi povas esti aŭtoro de *Facila Vento* kaj la Reta Revuo! Por kontribui, skribu al la redakcio *revuo.esperanto@gmail.com*

# INK-konkurso: premio-ceremonio kaj ne nur



La ceremonion gvidas Stela Besenyei-Merger

Ĉiuj partoprenantoj de la VK-3 povis spekti premio-ceremonion de INK (Interkultura Novelo-Konkurso). INK estas konkurso organizata de Akademio Literatura de Esperanto (ALE) kaj aŭspiciata de UEA. La lanĉo de INK okazis la 20-an de septembro 2020, dum la Printempa Inaŭguro de la Monda Festivalo de Esperanto. La temo de la konkurso estas "KOVIM-19, kiel ĝi ŝanĝis nin?". Anoj de la ĵurio venis el diversaj kontinentoj kaj taksis la novelojn rete.




La gajnintoj estis anoncitaj dum la 107-a UK. Libro kun gajnintaj verkoj kaj kelkaj aliaj, aparte interesaj, aperis en la kongresaj sakoj de la partoprenantoj.


**Unuan premion gajnis:**
**Por *Amo en la tempoj de kovimo* Rafael Nogueras**
**Duan premion gajnis kune:**
**Por *La sekreta recepto James Bridge* kaj por *Ĉu ne pli bone hejme?* Rafael Nogueras**
**Trian premion gajnis kune:**
**Por *La tricenttrideksepa tago* Sten Johansson kaj por *La brakumklubo* Martin Rue**

La dua INK-konkurso jam kolektis sian rikolton kaj kajeroj trafis manojn de ĵurianoj. La temo de la 2-a INK estas "Nokta vojaĝo". Ĝi estis inspirita de Yves Desrosiers kaj lia albumo *Nokta Ŝoforo*.

# INK. Mia unua sperto esti ĵuriano

Anna Striganova

Kiam mi eksciis, ke la temo de la unua en mia vivo literatura konkurso, kiun mi partoprenas kiel ĵuriano, estas KOVIM, mi sentis seniluziiĝon, ja la temo estas unue tro malvasta kaj due tro doloriga pro multaj kialoj. Kaj, jes, kadre de tiu temo mi atendis rakontojn similajn unu la alian. Mi eĉ ne imagis kia bunteco atendis min! Foje naivaj, foje amuzaj, foje filozofiece pezaj, foje netolereble dolorigaj – la rakontoj trans prismo de pandemio parolis certe ne nur pri ĝi. Jen knabino kiu inter enfermitaj hejme homoj trovas la plej enfermitan kaj pere de Esperanto trovas ŝlosilon al lia koro. Jen junulo trovanta sin en strato, kie pro certaj kialoj mankas homoj, kaj en malpleno li kapablas ekaŭdi finfine melodion de sia propra vivo. Jen patro kaj filino priplorante forpasintan avon kaj neeblon normale adiaŭi lin pro enŝlosiĝoj, ŝerce ekbabilas kun malnova tablo pri kuirsekretoj de avĉjo, kaj parolante kun muta tablo ili unuafoje dum multaj jaroj sukcesas aŭdi kaj kompreni unu la alian.



Mia desegnaĵo por *La brakumklubo*, okupinta la trian lokon

Kaptis mian atenton, ke la similaj temoj kaj vidpunktoj aperis en rakontoj de tre diversaj aŭtoroj: kelkaj rakontoj per okuloj de iu dorlotbesto, kelkaj rakontoj pri mondo de futuro, kiun ŝanĝis KOVIM. Unu

el tiaj – mia ŝatata – nun mi povas konfesi– rakontas ĝuste pri tia futuro, kie distanco estas leĝo, kaj brakumo – nepardonebla krimo, kaj vivi necesas modeste. Sed avino de la heroo ja sukcesis ĝustatempe montri kiel varmas parenca brakumo kaj kiom bongustas teo, en kiun oni malŝpare metis iom da sukero. Do, en la rakontoj KOVIM estis nur prismo, trans kiu aŭtoroj montis siajn proprajn problemojn, revojn, vivmanierojn.

Apartan lokon en la konkurso okupas tavolo de rakontoj, kie la aŭtoroj priskribis vivon sen plibeligoj: jen avino, kiu perdinte eblon vidi gefilojn kaj genevojn poiomete perdas volon leviĝi de sia lito, jen geolduloj en maljunulejo, kiuj helpas demeti maskojn al aliaj, kiuj povas nek moviĝi, nek bone spiri. Kaj jen estas homoj, de kiuj oni forprenis rajton lastfoje vidi siajn gepatrojn, eĉ trans barilo de malsanulejo. Kaj jen estas homo, kiu forŝiras rozojn por ke ili ne tentu aliajn homojn eliri eksteren, kie iĝis tiel danĝere. Tiaj rakontoj estas ege dolorigaj por legi, verŝajne eĉ pli dolorigaj por verki, sed ja ili estas sinceraj, ili estas animo de tiu malfacila tempo.

Do, mi tralegis la tutan mondon! Jes-jes, tutan mondon kaj tio senteblis! Ĉiam mi provis diveni landon, de kiu originas tiu aŭ alia aŭtoro laŭ stilo, gramatikaĵoj, rilatoj inter herooj. Tio estis tre interese kaj foje trafe!

Aparte esperige por mi estis vidi la rezultojn. Ĝis la lasta momento mi timis, ke venkos pli moralecaj, pli edukaj rakontoj, sed je venkis ĝuste tiuj, legante kiujn mi ploris kaj ridis, evidente ne nur mi :) Do ne nur mi, evidente opinias, ke ne tiom gravas en verko la ideo mem, sed io, kion tiu verko, per larmoj kaj ridoj, ŝanĝis en niaj koroj. Ne temo de KOVIM, sed brilanta trans ĝi beleco kaj bunteco de homaj sentoj.

**P.S.** Mi ŝatis tiun sperton. Tiom grade, ke la dosiero kun konkursintaj tekstoj, voĉdontabeleto kaj miaj notoj ĝis nun kuŝas sur la ĉefa ekrano de mia komputilo kaj mi ne povas translokigi ilin ĉar ili ĉiutage plibonigas mian humoron.

## Ne forgesu aliĝi al la 108-a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2023 en Torino, Italio!




Aliĝi eblas ĉi tie: *uk.esperanto.net/2023*. Aliĝoj dum la unua aliĝperiodo (ĝis la 31-a de decembro 2022) ĝuas la plej bonajn rabatojn. La 108-a UK okazos sub la temo “Enmigrado: kunfluo de homaj valoroj” kaj la reĝisoro de la kongresa temo estos Thomas Bormann. La scienca programo, kiel kutime, estas kunordigata de prof. Amri Wandel. Pri la ekskursoj zorgas Alessandro Amerio, pluraj ekskursoj estas organizataj kaj en Torino, kaj en aliaj gravaj urboj en norda Italio, ankaŭ okazos naturaj ekskursoj al montetoj kaj lagoj.

**La retejo de LKK:**
***https://www.esperanto.it/torino2023***



Dum la Solena Inaŭguro de VK3




### Ĉu vi ŝatus helpi antaŭ kaj dum la Universala Kongreso?

Ajna kapablo povas esti utila: la LKK ĝojos havi vin en la volontula teamo, tiel ke ĉiuj kontribuu al sukcesa evento! Se vi interesiĝas helpi aŭ se vi havas demandojn/proponojn, skribu al la LKK ĉe UK2023sekretario@esperanto.it aldonande “Volontulado por UK” al la mesaĝtemo.